Petra

Petra estas nabatea urbo, la plej konata turisma altiraĵo en Jordanio, troviĝanta 262 km sude de Amano.

La urbo estiĝis antaŭ 2000 jaroj kiel provizora rifuĝejo de nomadaj nabateaj araboj, beduenoj, kiuj venis ĉi tien el nordo de Araba Duoninsulo. Ili ekloĝis en kelke da kavernoj kaj baldaŭ ili konsciis, ke ili povas tre facile ŝirmi tiun ĉi lokon antaŭ malamikoj. Tiel Petra estiĝis kvazaŭ defendurbo. En Petra senĉese parte supervivas beduenoj. Vizitantoj povas vidi ilin atendantaj kun siaj ĉevaloj kaj kameloj je klientoj, al kiuj ili povas proponi neforgeseblan ekskurson tra ilia rozkolora urbo.

Oni venas en la areon piede (eventuale surĉevale aŭ surkamele) tra tektona breĉo nomata "Siq". Tiu ĉi pado estas longa ĉirkaŭ unu kilometron, en kelkaj lokoj oni havas super si rokklifojn superantaj 100 metrojn. En ties fino la breĉo mallarĝiĝos je kelke da metroj, por ke subite aperu antaŭ la vizitantoj "Trezorejo" - *El Khazneh*, "templo" hakita en la rokon. Ĝi apartenas al la plej fortaj spertoj de la tuta vizito en Petra.

El Khazneh estas unu el la plej elegantaj antikaj memorigaĵoj, hakitaj en la rokon, havanta altecon de pli ol 40 metroj kaj larĝecon de 30 metroj. Kvankam tiu ĉi laboraĵo impresas kiel grandega konstruaĵo, en la fakto temas pri multe plastika reliefo ol pri la konstruaĵo.

Malantaŭ "Trezorejo" troviĝas spaco, kie vizitanto povas ekvidi centojn da konstruaĵoj, templojn, reĝkriptojn, pli grandajn aŭ malpli grandajn domojn, sepultkameraojn, kanalojn transportantaj akvon en la urbon, akvorezervujojn, banlokojn, volbpordegojn, pavimitajn ŝoseojn. Inter signifaj memorigaĵoj apartenas ankaŭ romia teatro por 3 mil vizitantoj. Ĉio ĉi estas aŭ hakita aŭ konstruita el kolora sabloŝtono.

Sed Petra ne estas nur loko, kie estas troveblaj spuroj de nabatea civilizo. Proksimume post 15 minutoj de aŭtoveturado oni povas veni ĝis Beidho kaj Basto, kie estas 8 000 jarojn malnovaj elfosaĵoj de vilaĝoj el ŝtonepoko. Eblas viziti krom tio ankaŭ ruinojn de vilaĝoj de bibliaj edomitoj aŭ promeni tra restaĵoj de romia fortikaĵo en Udruho.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Petra_(urbo)